
HEJS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORINO:
F-INO ITZIAR ARTECHE

Nro. 89 - 1974

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 2.ª
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



# MARO, SUNO, KAJ ... KONGRESOJ

# ENHAVO

Valladolid.XXXIVa Hispana Kongreso....2-3-4-5
Oficiala Komuniko...........................5
30a IJK...................................6-7
Hamburgo.La Kongreso de la estonteco...8-9-10
Vi povas kunlabori..........................10
Novaj energiaj rimedoj (fino)...............11
Humora paĝo.................................12

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de HEJS escepte en okazo de oficiala komuniko;ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro;do,pri la artikoloj respondecas la autoroj mem

= = = = = = = = = = = = = = = = = =

## NOTOJ:

—Ankoraŭ estas tempo por ke vi sendu foton por nia konkurso.Ne forgesu!Antaŭ la 1a de novembro!

—Ni bedaŭras la fakton ke ni siatempe ne povis publikigi raporton pri la IFEF-kongreso en Tarragona.Jam estas tro malfrue.

—La Ministerio por la Kulturaj Aferoj de Esperanto-lando organizas konkursojn pri traduko en nacian lingvon de originala poezia teksto en Esperanto kaj pri la plej bela desegnaĵo por la slogano:

"Esperanto juna maniero por paroli kun la mondo"

Informojn petu ĉe

Esperanto-Katedro pri Gastronomio,Condominio Serena
47038-Santarcangelo di Romagna-Italujo.

# VALLADOLID

## XXXIVa HISPANA KONGRESO

Unue, permesu al mi paroli pri la pasintjara Kongreso en Madrido. Verŝajne miaj vortoj, laŭ mi ne tro acidaj, ĝenis kelkajn esperantistojn. Certe, tio nur koncernis la pseŭdoesperantistojn. Mi humile petas pardonon kaj esperas ke tiu ĉi raporto ĝenos neniun senteman animon, kvankam malfacile estas ŝanĝigi vinagran menson.

Kaj nun, mi parolu pri la kongreso.

Valladolido, belega urbo, allogis ĉirkaŭ 300 kongresanoj , el kiuj, bedaŭrinde, tre malmultaj estis junaj. Eble ni iom kulpas pri tio, ĉar nur en la lasta tro malfrue dissendita numero ni rendevuis vin al ĝi. Fakto estas ke multe pli interesaj estas internaciaj kunvenoj, sed, se vi povas ĉeesti ambaŭ, venu renkonti la enlandan samideanaron (klopodu ne krokodili, kiel ĉiam).




La programo, perfekte disvolvigita de la valladolidaj gesamideanoj, estis la jena :

La 18an.,je la 18ah. okazis la HEJS-kunsido, pri kiu mi raportos en la fino de la artikolo. Je la 23ah. estis la "junulara" balo kun la elekto de F-ino. Esperanto, ĉi-jare la ĉarma kaj bela Bilbao'anino Mely Palacios. Mi diras "junulara" ĉar, pro la ne granda nombro de junuloj, la ĉeesto de ne junaj kongresanoj estis tre rimarkebla . Mi ne deziras kritiki, sed danki ilian vigligon de la danceja etoso.

La 19an.,je la 10a matene, meso en esperanto, kaj je la 12a solena malfermo, kie salutis ĉiuj delegitoj de grupoj kaj sekcioj. Gin ĉeestis oficialaj reprezentantoj kaj la Valladolida provincestro.

Vespere, ĝis la 20ª h., laborkunsido de HEF pritraktis temojn diskutotajn en la ĝenerala kunveno. Je la 20ª H.,prelego en esperanto pri "Evoluo de la lingvo Esperanto". Je la 22ª, fare de la "Coral Vallisoleta na",ĥora kantado finita per bonvola eldirado de "La Espero" .

La 20an. matene aŭtobusa ekskurso tra la urbo.Ves pere okazis la ekzamenoj; neesperite, multaj deziris partopreni en ili (kapabla esperantisto kaj kapabla profesoro). Fakto estas ke oni celas pliseriozigi ilin per starigo de ekzamena komisiono se eble kun agnosko de la oficiala eduka instanco; tio estas apro bita de la ĝenerala kunveno poste okazinta- sed tial ke ĝi ankoraŭ ne ekzistis, nepre ambaŭ ekzamenoj devis esti jam pripensitaj rilate la demandaron kaj juĝantaron, kaj ne nur la komenchoron.Je la 19ª okazis informa kunsido pri UEA kaj je la 20ª, hispanlingva prelego: "Esperanto y el compromiso temporal".

La 21an. tuttaga ekskurso al Salamanca, belega ur bo plena de monumentoj, kiu finiĝis per kampara festo. Bedaŭrinde mankis taŭgaj iloj kaj ludantoj; la subskribinto sidis, komforte pro......laceco.

La 22an. ni vizitis fabrikojn kaj poste okazis la akcepto en la urbodomo. Vespere, ĝenerala kunveno de HEF, kies ĉefaj temoj estis la plialtigo de la HEF-kotizo.ĝis 250 ptoj.; starigo de oficiala ekzamena komisiono, elekto de venontjara kongresurbo, k.t.p.. Mi devas plendi pro tio ke, kiam estis la 20ª h,pretekstante la alvenon de aŭtoritatuloj por la fermo de la kongreso, la tabla estraro ĉesigis la ankoraŭ ne finiĝintan diskutadon de la kunveno. Mi ne vidis tiajn instancojn;do, malgraŭ la horo, tiu diskutado devis daŭri. Tuj poste, la Ferma kunsido, kaj je la 22ª h. oficiala bankedo, kiu feliĉe, ne havis longajn prelegojn je la fino, kaj permesis veran fermon de la kongreso en dancejo.

Resume, la kongresa programo bone disvolviĝis, bedaŭrinde la televido ne raportis, la urbo montris multajn kongresajn afiŝojn en disaj lokoj; la radio diskonigis la kongreson al la tuta Hispanujo per progra-

mo "25ªhoro" kaj ankaŭ alia intervjuo en muzika programo, kaj la enurba gazetaro atentis pri ni kaj pri nia F-ino. Esperanto. Ĉio ĉi helpos la urban movadon.

La venontjara kongreso okazos en Lérida. Kelkaj portugalaj gesamideanoj ankaŭ partoprenis kaj invitis nin al Braga, kie okazos venontjare la 1ª portugala Kongreso. Bela afero estus kune okazigi ambaŭ kongresojn, sed ekzistas malfacilaĵoj por tio. Tamen ankaŭ estas dezirinda la ĉeesto al tiu ĉi kongreso por apogi la burĝonon de la portugala movado.

Nun ni parolu pri HEJS. En la kunsido de la 18ª la prezidanto parolis pri niaj ĉi-jaraj projektoj (vidu nº 86) kaj pri ilia efektiviĝo. La planko de la kunsida ĉambro tuj malsekiĝis pro la larmoj de la aŭskultantoj: Atingoj estis la eldono de membrokarto (donaco de S-ro. Petro Nuez) kaj de adresaro, sed ĉio alia preskaŭ ne marŝis: -la helpo al la lernado de Esperanto por hispanlingvanoj nur efektiviĝis per sendo de vortaroj kaj propagandiloj al studenta domo en Budapest (tie estas sudamerikaj studentoj),sed neniu membro pretis helpi, -la pligrandigo de nia membraro ne efektiviĝis, oni devas konstati ke plimulto el la delegitoj ne nur ne propagandis HEJS, sed ankaŭ neglektis la velan pagon de la kotizo; tiel, pro kelkaj rifuzoj kaj nekonataj adresŝanĝoj, tre eble ĉijare ni estas pli malmultaj, -ĝis nun neniu sendis foton por la konkurso, kaj se ni ne mencias la kunlaboraĵojn de Sabadell kaj Santander, nia bulteno ne havas pliajn verkantojn. Ni ĉiuj konsciu: HEJS estas esperanta sekcio, ne nur revuo, ni ĉiuj helpu la agadon kaj kunlaboru per faktoj kaj sugestoj. Pro decido de la ĉeestantaro, ĉiu paginta kontraŭpage ankaŭ ricevos membrokarton, kio signifos grandan laboron por nia sekretariino. Kaj venontjare, vi delegito, vi, simpla membro, pagu mem vian kotizon, kaj tiel vi faciligos nian laboron.

Ne okazis HEJS-tendaro, verŝajne la datoj ne estis konvenaj. Ni denove kunvokas ĝin. Provizore, ni projektis por tio la Sanktan Semajnon, de la 27ª ĝis la 30ª de Marto en Zaragoza.

· Ni petas al vi bonvolu sendi viajn sugestojn pri konveno de tiuj aŭ aliaj datoj, programo, k.t.p. . Ankaŭ oni povas starigi junularan programon por la kongresoj.

Je la fino de la kunsido la estonteco videbliĝis pli esperiga kaj ni povis gaje partopreni la "junularan" balon. Nur ni esperu kaj kunlaboru por ke ĉio sukcese efektiviĝos.

A S I E R

# OFICIALA KOMUNIKO

Dum la lasta monato pluraj estis la ŝanĝoj en la konsisto de nia aktivularo. Tio estas pruvo de ekvigliĝo en nia movado. Ni dankas la laboron de la kunlaborintoj kaj varme akceptas la novan viviĝan sangon.

Eksiĝoj:

F-ino Ana Régulo ĉesas kiel HEJS-delegito en La Laguna.

S-ro José Carlos Quintas ĉesas kiel HEJS-estrarano kaj delegito en Vigo.

S-ro Juan Azcuénaga ĉesas kiel vicprezidanto pri rilatoj kun TEJO kaj delegito en Santander. Nun, li estas TEJO-estrarano.

Novaj postenoj:

S-ro Jaime Canoa, delegito por Vigo.

S-ro Augusto Casquero, delegito por Madrid.

S-ro Leandro Trujillo, delegito por La Laguna kaj HEJS-estrarano pri laborplano.

S-ro Miguel Gutiérrez, delegito por Santander kaj vicprezidanto pri rila[illegible]O.

## 30a ijk mjunstero

La tre densa programo ne ebligis ĉeeston en ĉiuj eroj, kaj la samtempa okazado de IJK kaj Seminario "Lingvo kaj Socio", organizita de KER-komisiono de TEJO, nur permesis partan partoprenon. Aliĝis 251 personoj el 30 landoj (laŭ ricevita "Listo de partoprenantoj").

Dum la IJK TEJO-organizado, la temo de la konferenco: "Edukado" kaj amuzo estis zorgataj en la programo por ke ĉiu ĝuu la plej gravan jaran manifestacion de TEJO. Amasa hispana partopreno, kvankam la plimulto ne apartenas al HEJS, kio mi esperas estu baldaŭ solvita.

En la iama principepiskopa kastelo, nun centro de la Universitato, okazis la oficiala malfermo de la IJK, kun samtempa tradukado en la germanan. Parolis S-ino Szabó-Felsö, U. Brandenburg, Klünder, Fischer, Helmut, Tonkin kaj F-ino Triolle. Surpriza estis ke prezidanto de Centra Junulara Laborrondo parolis esperante (li klarigis ke iam, antaŭ 30 jaroj, li studis ĝin). La nova prezidanto de UEA, D-ro Humphrey Tonkin, transdonis la saluton de UEA kaj de ties estraro, menciis sian estintan aktivadon en TEJO kaj diris ke IJKK trovis sorĉan formulon de seriozeco kaj amuziĝo por IJK.

Oni pritraktis organizajn problemojn de TEJO dum kvar komitatkunsidoj, unu plenkunsido kaj pluraj estraraj kunvenoj. Reprezentantoj de HEJS partoprenis ankaŭ en komisionoj Financa kaj pri Mezlerneja Agado, kie oni diskutis koncernajn problemojn. Rezulte de tio 4 hispanoj apartenas nun al la TEJO-komitato: 2 komitatanoj A, reprezentantoj de HEJS-membraro, 1 komitatano B kaj 1 komitatano C. Estas elstara evento por nia organizo havi tiom da membroj en la supera organo de TEJO, kio signifas ke la laboro de HEJS estas alte aprezata de eksterlandanoj.

"Edukado" estas sufiĉe vasta temo, kaj por pli fake studi ĝin oni organizis diversajn laborgrupojn, el kiuj okazis jenaj: "Cibernetiko kaj esperanto-instruado" (gvidanto: prof-o Helmar Frank); "Elokventeco kaj praktika edukado" (Paul Peeraerts); "Edukado al paco" (Ecki Woite); "Kontraŭaŭtoritata edukado?" (Hermann kaj Ina Tautorat); "Grupdinamika studrondo" (Hans Eichhorn); kaj "Laborplano de TEJO 1974-77" (Flóra Szabó-Felsö). Krome, post la inaŭguro, referaĵo de prof-o Frank: "Lingvopolitiko por Eŭropo".

Fakta inaŭguro estis la interkona balo. Aliaj amuzeroj estis teatra vespero, gasteja vespero, filmprezentado, kampfajro, kontraŭkokaliga vespero kaj la ekskurso. Dum la teatra vespero pola trupo "Antoni Grzebowski" rolis "Proksima nekonato", kies aŭtoro estis Aleksander Scibor-Rylski, en traduko de Jerzy Grum. Filmo pri la "2a IJK de TJO" montris la grandan diferencon inter tiu amuza kunveno kaj la nuna serioza konferenco; ankaŭ ni konstatis diferencon inter tiama flaginvado kaj la nura ekzisto de unusola verda flago antaŭ la nuna konferencejo. Tipa ŝicenfesto kaj ŝicenbalo estis dum la ekskurso. "Kvarteto Esperanto", ĉeĥa muzikensemblo, regalis nin per agrabla muziko por la baloj.

Krome, okazis vizitoj al kalkulcentro, klinikoj kaj biblioteko, akcepto ĉe la urbestro en fama Pacsalono, urbovizitado kaj parolado de Humphrey Tonkin. Ankaŭ estis kunveno de la estraroj de TEJO kaj HEJS.

El la eta parolado de D-ro Tonkin mi citas: "En la lastaj jaroj (ni diru en la pasintaj 10 aŭ 20 jaroj) UEA evoluigis la principon de tiel nomata 'pozitiva neŭtraleco'. Mi tion povus interpreti laŭ jena maniero: UEA ne prenas politikajn poziciojn; ĝi restas neŭtrala kiam temas pri politiko, sed samtempe ĝi ja okupiĝas pri tiuj grandaj sociaj demandoj kiuj rilatas al lingvoj. Kiel vi scias estas malfacile tre ofte fari klaran disdividon inter lingvaj demandoj kaj politikaj demandoj, sed UEA restas kiel eble plej neŭtrala pri ĝeneralaj politikaj demandoj, kvankam prenante pozicion kiam temas pri la utiligo de internaciaj rimedoj por faciligi la lingvan problemon." Li ankaŭ diris: "Ekster Esperantistaj rondoj la homoj neniam aŭdis pri la Esperanto-kulturo: ni nenion faris, efektive, por disfamigi la ekziston de tiu unika kulturo kiu estas la nia, kaj kiu ne limiĝas simple komprenebele al literaturo, sed ankaŭ inkluzivas ĝuste kongresojn, aŭ konferencojn, kiel la nuna; tiu estas unika etoso, unika atmosfero, unika evento kiun ni ĉiuj partoprenas".

Do, malgraŭ krokodilantoj, sukcesa IJK, almenaŭ el HEJS-vidpunkto. La hispana partoprenantaro, kvankam tre aktiva, ofte montris ne sufiĉan konon de la internacia lingvo (kio, bedaŭrinde, okazis ankaŭ al multaj alilandanoj). Pro tio mi konsilas ke partoprenontoj de IJK serioze studu la lingvon, kaj tiamaniere interkompreniĝo pli facile estos. Tamen, mi laŭdas iliajn klopodojn por plene partopreni la diversajn IJK-aranĝojn, tiel kiel ilian kontribuon por plej sukcesa IJK.

JUAN AZCUÉNAGA

# HAMBURGO

## LA KONGRESO DE LA ESTONTECO

Ĉi-jare la U.K. okazis en Hamburgo,urbo kiu portas tre interesan ŝarĝon de historio,ĝi estas sufiĉe konata kiel libera kaj hansa urbo.Kongresejo estis la Hamburga Kongresa Centro,miriga konstruaĵo,moderna kun adekvataj kondiĉoj favoraj al la bona funkciado de la kongreso;al tio ĉi ni devas aldoni la sufiĉe bonan organizadon kiun oferis al ni la L.K.K.,ĉiuj okazaĵoj en la kongreso,ĉu kunvenoj, ĉu aliaj eventoj,kiel teatraĵoj,k.t.p.,estis oferitaj al la kongresanoj tute sen interrompoj,kaj kvankam multaj eventoj,pro la ŝarĝita programo,estis samtempaj,tie ekzistis tre bona informado kaj kunordigo por ke ĉio ebene fluos.Finfine,Hamburgo estis por ĉiuj ekzemplo de ordo kaj rekta agado,kompreneble ke jam ĉion ĉi ni esperis de niaj germanaj ges-anoj. ĉu ne?.

Tuj en la komenco de la kongreso,la intereso de la kongresanoj kuniĝis en la kunvenoj de la Komitato de UEA.Kial?Unue,mi ne povis klarigi al mi la kialon de la intereso,sed la etoso estis de la komenco sufiĉe maltrankvila;kompreneble,ankaŭ mi interesiĝis,sed estis por mi malfacila tasko preni la sencon de la akraj kaj laŭtvoĉaj diskutoj,de la insultoj inter komitatanoj kaj eksiĝoj...ĉu ĉi tio estas Esperantujo?...Jes,jes...kio okazas estas tute natura kaj simpla por tiuj kiuj de antaŭ multe da tempo konas Esperantujon en la alteco,sed ne por simplaj esperantistoj ĝenerale.Ĉi tio estas pruvo

de informadmanko.Ŝajnas al mi ke en Esperantujo ekzistas verda aristokratio,kiu ĉion kuiras en Esperanto-Movado,kaj ĉion manĝas,kaj aliflanke ekzistas la amaso,la verda plebo...

La laborkunsidoj de la Komitato komenciĝis per la plena eksiĝo de la estraro kaj miskomprenoj pri la elekto de novaj komitatanoj C,sufiĉe klara estas la afero,en Esperantujo same kiel en la mondo (ĝi estas en la mondo),ekzistas konfliktoj.Ĉu konfliktoj inter komitatanoj de malsamaj politiktendencoj?Ĉu generaciaj konfliktoj?;mi kredas ke en Esperantujo ekzistas ambaŭ konfliktoj sed tre miksitaj. Finfine,la konkludo estis elekto de nova estraro, (preskaŭ tute nova estraro);por la prezidanteca posteno estis elektita juna,aktiva kaj vigla homo:S-ro Tonkin,li antaŭe estis aktivulo en la kadro de TEJO (nun li estas profesoro en la Universitato de Harvard) kaj la adiaŭo de Prof. Ivo Lapenna "por ĉiam" de la kadro de la universalaj kongresoj de Esperanto,kune kun lia eksiĝo kiel komitatano B kaj el ĉiuj liaj funkcioj por Esperanto,eĉ li forlasis C.E.D. kiun li mem gvidis en Londono.

Multaj homoj timas pri la neŭtraleco de UEA, ankaŭ reprezentantoj de Hispanujo,sed ŝajnas al mi ke la termino neŭtraleco estas ankoraŭ ne sufiĉe klara termino por multaj personoj kiuj preferas kompreni por neŭtraleco fari nenion;do,kion ni devas kompreni por neŭtraleco?

Jes,mi opinias ke ĉi tiu momento estas nek facila por Esperanto,nek estas dolĉaĵo por la nova estraro de U.E.A.,sed la eventoj de Hamburgo pruvas

ke Esperanto bezonas ŝanĝiĝi por ne morti.Pro tio, malgraŭ la nunaj malfacilaĵoj,ni devas rigardi kun espero la estontecon;do,ne estas ĉi tiu momento por timo.

Nu,ni povas aldoni ĉi tie la vortojn de Prof. I. Lapenna kiuj aperas en artikolo de la revuo Esperanto,julio-augusto 1974,"Sugestoj pri agadprogramo de UEA por la sekvanta trijara periodo (1974-1977)". "Nian tutan energion ni devas antaŭ ĉio dediĉi al la laboro por disvastigo de la lingvo kaj la eventualan 'plus energion' kaj atakemon ni prefere direktu kontraŭ niajn komunajn malamikojn ol kontraŭ nin mem".

LEANDRO TRUJILLO (La Laguna)

# VI POVAS KUNLABORI!

Dum la pasinta Junulara Kongreso en Münster, kelkaj hispanoj,amantaj la muzikan arton sed ne regantaj ĝin,regalis la altkvalitajn orelojn de la alilandanoj per krokodila kantaĉado de tiuj kanzonoj kutime kantataj de ni dum ekskursoj (Asturias,patria querida,ktp.) Tiel alloga estis la spektaklo,ke oni petis al ni ke ni traduku ilin en Esperanton.

Ni projektas eldoni eksterordinaran numeron enhavantan tiujn kanzonojn.Sed por traduki ni bezonas la tekston.Do,se vi konas tekston de kanzono de "tuna",sudamerika,ktp.,kantebla dum ekskurso,sendu ĝin al ni.

Dankon nome de la kantaĉuloj.

# NOVAJ ENERGIAJ RIMEDOJ

(FINO)

La energia krizo estigita de la arabo-israela milito plirapidigis la konstruadon de atomaj centraloj, kaj stimulas la akceladon de la esplorado kaj provado de reproduktaj supergeneratoraj aŭ rapidaj reaktoroj.

Per 1 kg. da uranio uzita en reaktoro de malpeza akvo produktiĝas 30-45000 kv-h.
En "fuel-oil" centralo oni bezonas 6-9 tunojn por produkti tiun kvanton da kv..
En la supergeneratoraj reaktoroj oni povos produkti per 1 Kg. da uranio 3.000.000 kv.h.; produktebla j per 600 tunoj da " fuel-Oil " .

Same kiel la rapidaj reaktoroj estas konsekvence de la urania bombo, la hidrogena bombo estis la bazo por la esplorado de la teknika ebleco produkti termoatoman elektron; oni fidas ke jam en 1.980ª tiu teknika ebleco estos pruvita ĉu per la magneta lokigo aŭ la kunigo per "laser".
Jam en la 2.000ª j. la unua prototipo estos kreita.

Mallonge, kaj kiel resumo de tiu-ĉi artikolo ni devas esperi ke la ŝtatoj duobligos la penojn en la scienca, teknologia kaj financa kampo, por ke la tuta tera loĝantaro povu ĝui pli grandan komforton.

JOSE MIGUEL ? ?

# ATENTU!

La sabadella esperantista junularo-JESS-,organizas la 11-an Autunan Junularan Esperantistan Renkontiĝon,kiu okazos en monaĥinejo sur la monto Montserrat la 5-an kaj 6-an de oktobro.

Ni deziras al tiu ĉi vigla junulara grupo la plej grandan sukceson en tiu okazigo.

Informojn kaj aliĝilon mendu ĉe:
JESS Centro Esperanto Sabadell
Apdo. 407 SABADELL

# FIKSA IDEO



AHA!
kio OKAZAS...?
ĈU VI NE HAVAS ALIAN AĴON POR FARI KROM RIGARDI MIN...?